

« Unua nivelo »

Regularo pri ekzameno « Unua nivelo », plej malalta nivelo el tri.

La « Unua nivelo » atingas proksimume la celojn de la nivelo A1 aŭ A2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) lanĉita de la Konsilio de Eŭropo ; tiu kadro jam ne plu estas nur eŭropa sed tutmonda (aliĝis la korea lingvo, la japana, la ĉina, la araba kaj Esperanto)

La kapabloj por atingi tiun nivelon estas jenaj, la kandidato devos sukcesi en tiaj frazoj :

- Mi iras al mia kurso.
- Mi iras Japanien.
- Mi laboras en la kuirejo.
- Mia kato nomiĝas Kiti.
- Vespere mi ne manĝas multe.
- Ĉu vi venis piede?
- Kien vi iros ?
- Kiam vi eklernis Esperanton ?
- Kiom da lernantoj nun laboras?
- Per kiu ilo vi malfermis la skatolon?
- La muso estas malpli granda ol la kato.
- Ni havas vesperan kunvenon.
- Mi volas daŭrigi mian studadon de Esperanto.
- La kurso komenciĝas je la 20a horo.
- Mi komencas tradukon.
- Ruslando estas granda lando, landego.
- La studentoj forgesis sian vortaron.
- Oni bezonas plurajn vortojn por konstrui frazon.
- Mi kredas, ke li estas tre bona instruisto.

Fakto estas, ke por internaciaj ekzamenoj la kandidatoj devas foje vojaĝi foren. Do devas esti eblo akiri atestilon sen fora vojaĝo. La kandidatoj por « Unua Nivelo » devus trovi proksime de sia loĝloko eblon ekzameniĝi.

Dua aspekto : tiuj ekzamenoj estos parte pere de traduko el la nacia ĉeflingvo aŭ al la nacia ĉeflingvo.

Lingvaj konoj: Bezonataj scioj

1. Alfabeto („Poŝamiko“ paĝo 42)
2. Nombroj
3. Pluralo -j
4. Kvar diversaj uzoj de -n („Poŝamiko“ paĝo 11)
5. Ĉu; kiu, kie, kio, kiam, kiel, kiom da
6. Kio - ĉio - nenio. Kiam - ĉiam - neniam. Kie - ĉie - nenie.
7. Pli ol / plej el
8. Sur, sub, apud, en, al, ĝis, pri, por, pro, per, je
9. -ej-, -et-, -eg-, -ek-, -ar-, -il-, -aĵ-, -in-, -id-, ge-
10. Komencas-komenciĝas. Finas-finiĝas. Daŭras-daŭrigas.
Mi nomiĝas...
11. -is, -as, -os
12. Mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili.
13. Volas, devas, povas, kapablas, rajtas, kredas, opinias.

Kulturaj konoj: bezonataj scioj

1. Kreinto : Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)
2. Aperoĵaro de la „Unua Libro“ : 1887
3. Deveno de Zamenhof : Pollando-Ruslando
4. UNESCO aprobis du rezoluciojn favorajn al Esperanto
5. Centra Oficejo de UEA : Roterdamo, Nederlando.
6. 2012 : proks 2-3 milionoj da parolantoj, parolantoj en pli ol 120 landoj, 70 landaj asocioj ĉe UEA, 170 000 artikoloj ĉe wikipedia (en la jaro 2012)
7. Ekzisto de originala literaturo kaj tradukita literaturo el teatro, prozo kaj poezio.
8. Ekzisto de muzikgrupoj, kantoj.
9. Ekzisto de revuoj, gazetoj, radioelsendoj, televidprogramoj.
10. UEA estas neregistara organizo (NRO) ĉe UN kaj UNESCO.

EKZAMENO

Skriba parto :

Diktaĵo kun ĉiuj sonoj de la lingvo en nekonataj vortoj. (20 poentoj)

Traduko de frazetoj al Esperanto (10 frazoj) (30 poentoj)

Respondoj en Esperanto al demandoj en Esperanto (10 respondoj) (30 poentoj)

Kulturaj konoj. (5 demandoj) (20 poentoj)

Atingeblaj poentoj : 100

Parola parto :

Daŭro : 15 minutoj

Legado kun ĉiuj literoj de la lingvo en nekonataj vortoj. (20 poentoj)

Facila interparolado en esperanto. Kriterioj : kompreno de la demandoj kun adekvata respondado, amplekseco de vorttrezoro, originaleco kaj amplekso de la respondoj. (po 10 poentoj, sume 30 poentoj)

Eblaj temoj : studado, legado, sporto, muziko, familio, vojaĝado, enhejmaj okupoj, komputilo kaj retumado.

Atingeblaj poentoj : 50

Sukceslimo : 60%, do 90 el 150 poentoj

Loka Ekzamena Komisiono :

Unu membro de IRE kaj dua persono : instruisto de esperanto.

Atestilo

Kun mencio : « Unua Nivelo »

**Kun komento KONTENTIGE (90 - 110), BONE (111 - 130) TRE
BONE (131 - 150)**

Nome de IEK; ILEI.

IEK 2012-11-21